PREZO: 1:— Kr.

Sture-Tryckeriet, Stockholm 1943.

# MALGRANDA REVUO

N:RO 1 1943

1-a JARO

ENHAVO:


| | Paĝo |
|---|---|
| Antaŭparolo | 1 |
| Por la homo, de Stellan Engholm | 3 |
| Iom post iom, de Sven Backlund | 7 |
| Idealoj kaj idealismo, de Hjalmar Kihlberg | 9 |
| Labormetodoj de studrondoj, de Karl Söderberg | 13 |
| Kunlaboro, de Tulla Holfelt | 20 |
| Pretaj por ofensivo, de Artur Persson | 22 |
| Ĉu vi malvarmumas, Jakobo? de Martin Persson | 25 |
| La branĉetoj, de Stellan Engholm | 29 |


*Redaktoro — Eldonanto:*
*STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO*

Tore Johansson

# MALGRANDA REVUO

N:ro 1 1:a JARO 1943

## Antaŭparolo.

*Pro du ĉefaj kaŭzoj mi provas eldoni revuon. Unue: mi havas la senton, ke regas granda manko de nova legaĵo. Esperantisto, kiu ne legas, fariĝas indiferenta, kaj se li estas nova, li forglitas el la movado.*

*Grava estas certa dozo de nova legaĵo. Ĝi montras al la esperantisto, ke la movado vivas kaj evoluas. Tiel ĝi vigligas lin, donas novajn impulsojn kaj novan energion.*

*Eldoni revuon nun estas tre maloportune, ŝajnas preskaŭ sensence. Sed samtempe la bezono de tia organo estas pli granda ol iam. Tio igas min fari la provon.*

*Due: Ni bezonas periodaĵon, kiu koncentrigas la spiritan forton en nia movado, kolektas impulsojn kaj novajn bonajn pensojn de unuopaj kaj redonas tion al ĉiuj. Tia fortocentro estas necesa por ĉiu spirita movado.*

*Niaj svedaj esperantogazetoj ĝis certa grado plenumas ambaŭ el la nomitaj taskoj. Tamen ili esence estas kaj devas resti movadofakaj organoj. En nacia lingvo taga gazeto aŭ asocia revuo ne povas plenumi la taskon, kiun plenumas kultura revuo. Same estas en nia movado. Tia revuo, almenaŭ kiel mi imagas ĝin, ne estas malhelpo por niaj gazetoj. Se ĝi povas plivivigi la movadon, ĝi kontraŭe estas helpo al ili.*

*Donante la motivojn por la aperigo mi ĝis certa grado donis ankaŭ la celon. Tamen mi parolu iom pli konkrete pri ĝi.*

*La lingvo en la revuo estu korekta, tiel ke ĉiu leganto povos akcepti ĝin kiel bonan kaj imitindan esperanton rilate al korekteco. Ankaŭ la stilo de la artikoloj estu kiel eble plej bona kaj modela.*

*Rilate al enhavo ĝi estu esence kultura revuo. La artikoloj traktu ĝenerale kulturajn kaj ankaŭ speciale esperantajn aferojn. Belliteraturo ne manku, sed ĝia loko estu limigita. Ĉio estu en esperanto, kaj la artikoloj estu originalaj. Tio lasta ŝajnas al mi tre grava. Se esperanto estus por ni nura tradukrimedo, ni ne bezonus verki ion propran. Sed esperanto estas pli por ni. Kaj nur per propra kreado ni povos ion atingi. Nur per propra pensado kaj propra verkado ni plenumos nian taskon en nia movado. Per tio mi ne estas tute kontraŭ tradukoj, sed ili devas havi tre bonan motivon por sia apero.*

*Plue la artikoloj estu tiaj, ke ili vigligos la legantojn, donos impulsojn kaj entuziasmon, montros novajn eblecojn. Tio estas ja la ĉefa celo. Tial ili devas havi enhavon, kaj ili devas havi ĝin en konciza formo. Presado estas kosta, kaj ni ne havas monon por superflua presado.*

*Tiaj estas miaj deziroj. Tiu ĉi numero ne plene respondas al ili. Ĝi devus esti pli varia kaj havi pli da sugestoj por praktika laboro. Sed se la revuo vivos, ni havos tion.*

*Se la unua numero ne donos tro grandan malprofiton, mi provos daŭrigi per unu numero kvaronjare. Kaj se vi estas same konvinkitaj kiel mi pri la bezono de revuo kiel ligilo inter ni kaj fortocentro por nia laboro, vi certe faros vian plej bonan por daŭrigi ĝian vivon.*

*Stellan Engholm.*



# Por la homo

De STELLAN ENGHOLM

En la tuta historio de la esperanta movado oni malmulte parolis kaj skribis pri la morala rilato inter homo kaj homo. Zamenhof profunde pensis pri tiu temo kaj ankaŭ emis bazi la movadon sur koncepto pri interhoma konduto. Sed tiun koncepton oni ne aprobis kiel principon por la movado. Oni deklaris, ke aprobo aŭ malaprobo de tiu koncepto estas privata afero de la esperantistoj.

Verdire oni parolis kaj skribis pri homaranismo, eĉ sufiĉe multe, sed tio plej ofte okazis en maniero de revado pri estonta, utopia mondostato. Cetere la tuta historio konsistas el laboro por konvinki la mondon pri la grandaj avantaĝoj de nia lingvo. Oni ne parolis pri rilato inter homo kaj homo sed inter ŝtato kaj ŝtato kaj inter aliaj kolektivoj. Fakto estas, ke la esperantistoj, se ni komparas ilin kun aliaj ideaj unuiĝoj, preskaŭ tute ne parolis pri la morala rilato inter homo kaj homo.

Kaj tamen la tuta esperanta movado fakte, kvankam ne formale, estas bazita sur ideo pri rilato de homo al homo. Oni ne parolas pri ĝi, oni ofte eĉ ne estas konscia pri ĝi, sed ĉiu sekvas ĝin laŭ propra inklino. Oni ne predikas ĝin, sed oni faras tion, kio pli signifas, oni vivas laŭ ĝi.

Tiu ideo estas plena respekto de homo por homo, nenies superrego super alia. Estas la sama ideo kiel tiu de Jesuo: Kiel vi volas, ke la homoj agu al vi, tiel agu ankaŭ al ili. Aliaj grandaj instruistoj esprimis ĝin per similaj vortoj.

Zamenhof multe ŝuldas al malnova juda pensado, sed la ideo en la esperanta movado ne estas rekte transprenita de religio aŭ filozofio. Ĝi kvazaŭ naskiĝis denove en la esperantista mondo, kun juna, freŝa vivo. Tiuj, kiuj aliĝis al la movado, ĝenerale estis homoj, kiuj forlasis dogmojn sed havis fortan senton por la esenca en la homa vivo. Tial ili ne filozofis kaj disputis pri la ideo, sed tute simple vivis laŭ ĝi, sekvante siajn inklinojn. Kaj tiel ili kreis la malgrandan sed tamen mondampleksan respublikon de inter-

homa respekto kaj estimo, kies lingvo estas lingvo de amikeco.

Eksteruloj foje diras, ke la esperanta movado estas religio. Ili pli pravas ol ili scias, ĉar religio signifas serĉi sencon en la vivo, serĉi vojon por la vivado, egale ĉu oni nomas ĝin religio, filozofio, ideologio aŭ ion alian. Ni ne bezonas honti pro nia ideo. Ni nur atentu, ke ni ne fariĝu ia kurioza sekto sed estu konsciaj pri la esenca afero kaj sekvu ĝin.

Tio estas "la interna ideo". Sen tiu konscia aŭ nekonscia ideo pri rilato de homo al homo la esperanta movado ne ekzistus, kaj esperanto restus nura papera projekto. Nenio krom komuna vivosento kaj komuna serĉado por vivosenco povas tiel kunligi la plej diversajn homojn, kiel estas kunligitaj la esperantistoj en la tuta mondo. Nenio alia povas igi ilin tiel kaj tiom labori — laboro, kiu al eksterulo certe ŝajnas sencela kaj eble iom freneza.

Mi kredas, ke estas grave, ke ni estas aŭ fariĝos klare konsciaj pri tiu idea enhavo de nia movado. Realigo aŭ nerealigo de tiu ideo estas tre grava afero, ne nur por ni sed por ĉiuj homoj, por la tuta homaro.

Jam en nebula pasinto homoj komencis percepti tiun ideon. Spirite pli evoluintaj homoj pli kaj pli klare distingis ĝin, ĝis la spiritaj gvidantoj de la homaro fine klare vidis kaj komprenis ĝin kaj per simplaj vortoj, komprenoblaj por ĉiu homo, esprimis la plej gravan kaj plej perfektan regulon por homa kunvivado, kiu ĝis nun estas formita en la tuta historio. Ion pli perfektan ni ne povas eĉ imagi.

Tiu regulo estas absolute universala kaj nerefutebla. Neniu homo, eĉ neniu estaĵo, volas, ke oni agu malbone al li. El tiu simpla fakto sekvas, ke ni mem devas neniel agi malbone al aliaj. Nur per reciproka bona rilato de homo al homo ebliĝas harmonia kaj feliĉa vivado.

Por spirite iom evoluintaj homoj la regulo estas memkomprenebla. Personoj kiuj agas, kvazaŭ ĝi ne ekzistus aŭ estus falsa, montras per tio, ne ke la regulo estas malvera, sed ke ili mem postrestas en spirita evoluo.

Tia bonrilata interhoma vivo signifas liberon por la individuo. Ĝi estas almenaŭ la plej granda libero, kiu povas ekzisti en socio, kie homoj dependas de homoj.

Libero kaj bonrilata interhoma vivo estas necesaj, por ke la homo povu prosperi kaj evolui, por ke povu disvolviĝi la bonaj kapabloj kaj ebloj, kiuj troviĝas en la homo. Ankoraŭ tiuj kapabloj kaj ebloj estas malmulte ekzercitaj kaj evoluintaj.

Imagu pratempon kaj pratempan homon. Bestosimila li aspektas, preskaŭ kiel besto li vivas sur tero, kie ĉio ankoraŭ estas virga kaj sovaĝa. Rigardu tiun krudmakzelan beston kaj forviŝu el via konscio la tutan evoluon post tiuj tagoj. Kaj jen flustras al vi voĉo: "En tiu krudmakzela besto troviĝas mirindaj kapabloj kaj ebloj. Ankoraŭ ili estas nur embrioj, apenaŭ rimarkeblaj. Sed ili ĝermos kaj kreskos, kaj iun tagon tiu besto regos la tutan teron. Li ŝanĝos la aspekton de preskaŭ la tuta tersurfaco. Li kreos mirindajn rakontojn pri la enigmo de sia propra ekzisto kaj pri la enigmo de la tuta universo. Li pensos la plej subtilajn pensojn pri tiuj aferoj kaj pri la senco de la vivo, la vivo kiu nun signifas por li nur ĉasi, manĝi, dormi, generi. Li flugos sub la ĉielo pli rapide ol birdo, li parolos kun homoj en alia ekstremo de la mondo kiel kun apudulo. Li mezuros kaj pesos la ĉielajn korpojn, li rakontos al vi, kio okazis dum miloj da pasintaj jarmilionoj." Kaj vi dirus: "Tio ne estas ebla." Sed tiel fariĝis.

Kaj tamen multaj, multaj kapabloj kaj ebloj restas neuzataj aŭ malhelpataj en sia evoluo. Ankoraŭ restas en la homo multe de la krudmakzela besto el pratempo. Ni kulturis la teron, kulturis pensadon, kulturis arton kaj sciencon, kaj intelekton kaj teknikon ni kulturis preskaŭ ĝis detruo por la tuta homa gento.

Restas por ni kulturi nin mem, kulturi la arton de bona vivado. Ekzistas homoj kaj homgrupoj, kiuj tiurilate ankoraŭ troviĝas sur la stadio de pratempulo. Ili volas ĉion por si mem sed nenion por aliaj, volas esti respektataj en ĉio sed neniun respekton doni al aliaj. Ili furioziĝas kaj frakasas kaj detruas sen konscio pri tio, kion ili faras.

Multe restas por kulturi. "Ni en infanoj reĝidojn vidas,

sed maturajn reĝojn ni ne trovas". Ĉiu infano estas promeso pri plenumo de miljaraj revoj, estas promeso pri nova paŝo al pli bona kaj perfekta homo. Kion ni faras, por ke la promesoj plenumiĝu?

En la homoj troviĝas ankoraŭ multe da kapabloj kaj ebloj, kiuj estas nur embriaj aŭ ĝermantaj, eble multaj, pri kiuj ni eĉ ne scias. Rilate al vera spirita evoluo ni ankoraŭ estas kiel pratempuloj. Antaŭ ni kuŝas nekonata estonto, en kiu povos okazi en la spirita vivo same grandaj mirakloj kiel tiuj, kiuj ĝis nun okazis en intelektaj kaj inventaj kampoj. Kiel granda, loga aventuro kuŝas antaŭ ni la estonto. Kiel malantaŭ ni kuŝas tempo de landeltrovoj, sciencaj esploroj kaj miraklaj inventoj, tiel kuŝas antaŭ ni same mirindaj, nun eĉ neimageblaj aferoj, en la tempo kiam la homoj estos lernintaj la arton de bona kunvivado kaj de vivado en pli alta senco. —

Milionoj de niaj fratoj kuŝas mortigitaj, milionoj malsatas ĝis morto, milionoj estas sklavigitaj korpe kaj ligitaj spirite. Multe kulturis la homoj, pli multe restas por kulturi.

Post la milito . . .

Post la milito ĉio estos aranĝata en nova maniero. Nova estos la interrilato de ŝtatoj kaj popolgrupoj, nova estos la mondekonomio, nova la tuta vivkoncepto. Ni eniros tute novan mondepokon. — Certe vi legis pri tio en la gazetoj.

Se oni komencos pritrakti la simplan regulon "Agu al aliaj, kiel vi volas, ke ili agu al vi!", tiuokaze oni paŝon post paŝo iros al nova epoko, sed certe ne tre rapide. Malrapide oni forlasas malnovajn kutimojn. Se oni ne praktikos ĝin — ĉio restos la sama kiel antaŭe, malgraŭ ĉiuj grandaj vortoj. —

Ni daŭrigu sur nia vojo, ni daŭrigu nian laboron por la bona homa kunvivado, por la homo. Se tiu ideo ne povas doni al ni energion por plua penado, nenio povas tion fari.



## Iom post iom

De SVEN BACKLUND

Iom post iom mi fariĝis esperantisto.

Internacia Laboroficejo, kie mi laboris kiel interpretisto, ne estis esperantista. Ĝi estis trilingva: angla, franca, germana. Ĉiu interpretisto bezonis lerni tiujn tri lingvojn. La idealo por ĉiu eŭropano estis scii la tri "grandajn lingvojn".

Por la laboristoj tiu trilingva fundamento estis nur heredaĵo de la feŭda kaj burĝa Eŭropo. Tial en la laborista mondo estis ĝenerala tiu sento, ke laboristo havas rajton lerni la tri lingvojn tute kiel la aliaj klasoj de la socio. Pro tio oni trovas inter la laboristoj multajn kontraŭulojn de esperanto, kiu estas konsiderata kiel mizerlingvo.

Tiu situacio ŝanĝiĝis post la mondmilito 1914—1918. La germana lingvo ne estis plu rekonata. La lingva fundamento de Eŭropo fariĝis franca kaj angla. Kontraŭ tio protestis Germanujo kaj ankaŭ Hispanujo. Pli poste protestis ankaŭ Italujo kaj Sovetunio. Iom post iom la protesto fariĝis ĝenerala.

En Ligo de Nacioj oni komprenis, ke pli malpli baldaŭ estos necese transiri al uzo de internacia lingvo. Nek la angla nek la franca povas esti rekonata kiel sola internacia lingvo de la rusoj, de la hispanoj, de la germanoj aŭ — de la japanoj. Oni bezonis helplingvon, kiun povis rekoni la tuta mondo.

Tiel la mondo troviĝis en plena lingva krizo, kiam eksplodis la nova milito en 1939.

*

Neniu nacio esperas plu, ke ĝia nacia lingvo fariĝos sola internacia lingvo. La klasika trilingva fundamento eŭropa restas frakasita. Kiel formiĝos la estonto?

Ameriko certe restos dulingva, angla-hispana. Azio, enhavanta Japanujon, Ĉinujon, Hindujon, eble — tion mi tamen ne kredas — uzos kiel helplingvon la anglan. Sovetunio komprenehle uzos la rusan. Kaj Eŭropo! La eŭropa lingva fundamento estas kaj restos latina. Mi kredas ne

eble, ke germanoj kaj angloj rekonos la francan, la italan aŭ la hispanan kiel solan interpopolan eŭropan lingvon. Certe la komuna eŭropa lingvo estos esperanto.

*

Post la nuna milito ĉiu eŭropa nacio sekvos la ekzemplon de Islando, kiu ĉiam ĵaluze kaj forte konservis sian propran lingvon, rigardante la nacian lingvon kiel la plej bonan defendon kontraŭ fremdaj sinjoroj. La svisaj socioj (Zürich, Bern, Basel ktp.) same defendis sin kontraŭ germana penetro per obstina konservo de siaj propraj dialektoj.

Akceptante esperanton kiel solan eŭropan lingvon la eŭropaj popoloj defendos efike sian sendependecon en la nova kadro de Unuigita Eŭropo.

*

Tio estas logika, kaj post la nuna milito Eŭropo fariĝos logika, ĉar tio estas la sola vojo al paco.

La legantoj eble kontraŭdiras al mi dirante, ke mi pruvis nur la neceson de unu helplingvo sed ne pruvis, ke tiu lingvo necese estos esperanto.

Jes, estas vere. Estos drama momento, kiam la popoloj solene konsentos al uzo de internacia lingvo — drama kiel la voĉdonado en la jaro 1000 en Islando inter unu kaj alia kredo. Certe. Tamen la aliaj helplingvoj estas malsuperaj en komparo kun esperanto, ĉar esperanto estas historia kreajo intime ligita al grandaj problemoj de orienta Eŭropo. Neniu alia helplingvo baziĝas, kiel esperanto, sur m o v a d o. Tial la rezulto de voĉdonado ne estas dubinda.

La uzo de esperanto kiel nova latino de Eŭropo havos por Svedujo kaj por la tuta Nordo grandegan signifon. La komunikado kun la popoloj sur la orienta bordo de Balta maro estos ege faciligita, kiam finnoj, estonoj, latvoj, litovoj kaj poloj ĉiuj estos dulingvaj, ĉiuj esperantistoj, tute same kiel la skandinavoj.

Verŝajne nova historia periodo de Nordeŭropo komenciĝos kun la ĝenerala uzo de esperanto.

*



Mi diras: esperanto estos interpopola eŭropa lingvo. Ĉu ĝi ne estos lingvo universala?

La respondo al tiu demando estas malfacila. Ĝi dependos tute de la estonto de Eŭropo, de la estonto de nia civilizo romana kaj kristana en la mondo.

Vivo ĉiam estas batalo.

Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj . . .

# Idealoj kaj idealismo

*De HJALMAR KIHLBERG*

Idealo estas io, kion oni imagas en ĝia plej granda perfekto, la fincelo de la evoluo. Ĝi ankaŭ estas mezurilo por ekscii, ĉu evolua stadio estas alta aŭ malalta. De tempo al tempo oni parolas pri idealhomoj, t. e. morale perfektaj homoj. Idealismo estas pensado kaj agado, kiu neprofiteme penadas por atingi noblajn celojn aŭ altajn idealojn.

Dum la paso de la tempoj diversaj skoloj kaj idedirektoj starigis multajn diversajn idealojn kiel gvidstelojn por la kulturevoluo. Kun konsidero ĉefe al Okcidento estu menciataj tri kulturaj epokoj, kiuj havas diversajn idealojn. La antikva idealo estis harmonia unuiĝo inter la korpa kaj la anima beleco. Tiu idealo estas funde traktita kaj formulita de Platono, la granda greka filozofo. La mezepoka kulturidealo, kiu en multaj rilatoj estas influita de Aŭgustino, la eklezia patro, estis specife religia-asketa. Renesanco revenis al la antikva idealo kaj ribelis kontraŭ la ĝojomalriĉa asketa idealo, kiu forturnis sin de ĉiu natura ĝojo, kaj laŭ kiu oni atendis veran ĝojon nur transe de tiu ĉi mondo. La antikva kaj mezepoka kulturidealoj akcentis pli la sociajn vidpunktojn ol la renesanco, kiu pli akcentis la individuan liberon. Post la renesanco aperis multaj novaj kulturidealoj, sed ili ĉiuj esence estas varioj de la nun menciitaj.

En ĉiuj kampoj de la vivo troviĝas personoj, kiuj en sia

agado estas gvidataj de idealoj. La kulturaj eminentuloj, jes, eĉ ĉiu homo, kiu direktas iun evoluan kampon, materian aŭ animan, havas ian idealon kiel gvidstelon. Multfoje oni povas konstati, ke tiaj homoj laŭ la grado de sia idealismo estis kaj estas rigardataj kiel idealhomoj, do idealoj por la posteularo. Jes, oni povas konstati, ke la idealistoj estas la veraj gvidantoj de la homoj kaj de la homaro. Jen kelkaj ekzemploj:

Multege da civitanoj en Svisujo, eĉ la tuta loĝantaro, ricevis sian ideon pri bona socia reĝimo el la legenda sed certe ankaŭ parte vera historio pri Wilhelm Tell kaj Arnold Winkelried. Tiuj liberamantoj kaj sinoferemaj herooj certe instigis nekalkuleble multajn homojn en Svisujo, ke ili rigardu liberon kaj rajton decidi pri si mem, kiel pli grava ol ĉio alia. Tiuj legendaj-historiaj herooj estis, ankoraŭ estas kaj certe ankaŭ ĉiam restos idealo por tiu malgranda lando, kiu siavice nuntempe estas idealo por aliaj landoj koncerne politikan liberon.

Ankaŭ en niaj tagoj ni havas ekzemplon, kiu montras, kion signifas idealoj kaj idealismo en la homa vivo. En la okcidenta najbarlando de Svedujo la okupa potenco volis, kiel rakontas niaj gazetoj, per multaj kruelaj metodoj cedigi la instruistojn al obeo por kontraŭpatrujaj leĝoj kaj sendis proksimume sepcent instruistojn en ian sklavecon, esperante tiamaniere rompi ilian persiston, sed tio tute malsukcesis, kaj oni devis resendi la instruistojn.

Kiel ili povis elteni traktadon tiel kruelegan, ke unu instruisto eĉ mortis kaj multaj aliaj fariĝis korpe detruitaj por la tuta vivo? Tio estis ebla: ĉar ilin gvidis idealoj de amo al patrujo kaj libero. Nun oni kun granda estimo parolas pri tiuj instruistoj, kiuj, gviditaj de siaj idealoj, mem aperas kiel idealoj por ilia tuta popolo kaj en la estonto certe ankaŭ estos konsiderataj kiel tiaj, simile al la ĵus menciitaj svisaj herooj.

En la protestanta mondo Gustav Adolf el Svedujo ĉiam estis konsiderata kiel idealo koncerne patrujamon kaj oferemon por tiaj valoroj, kiujn liberaj homoj ŝatas pli ol ion alian, nome konscienca libero en religiaj kaj moralaj aferoj.



Ni ankaŭ ne forgesu la kreinton de tiu lingvo, en kiu tiuj ĉi pensoj estas skribitaj: kiel li de sia juneco, eĉ infaneco, kaj poste dum sia tuta vivo estis gvidata de la ideo krei lingvon, per kies helpo la homaro povu interfratiĝi. Estas kortuŝe legi lian propran rakonton pri tio. Pro sia sinoferema vivo en la servo de sia idealo li, la nobla idealisto, post sia morto kaj eĉ dum sia vivo fariĝis la persona idealo, la idealhomo, por ĉiuj tiuj, kiuj laboras por fratigi la homaron per helpo de supernacia, neŭtrala lingvo.

Fine ni rigardu la ekzemplon antaŭ ĉiuj aliaj, nome la biblian personon Jesuo el Nazaret. Lia idealo ĉiam estis vivi en tuta obeo al la volo de Dio. Li nome kredis, ke venos nova tempo, Dia regno, se la homoj sekvos lian ekzemplon. Se ni studas la evoluon de la kristana religio, ni vidas, ke ĉiuj morale grandaj religiaj personoj havis Jesuon el Nazaret kiel sian idealon kaj estis animitaj de lia sublima idealismo. Kaj laŭgrade kiel ili estis forte kortuŝitaj de lia supermezure granda personeco, ili ankaŭ sentis entuziasmon agi, kiel li agis. En la tuta mondo Jesuo estas la plej sublima idealo, kaj neniu havis tiel multajn vere moralajn sekvantojn kiel li. Lia historio vere montras la grandan signifon de idealoj kaj idealismo por la homoj kaj la homaro.

La veraj idealistoj do neniel estas tiaj nepraktikaj, realofremdaj, netaŭgaj estaĵoj, kiel la miopa homaro opinias, sed ili estas la veraj gvidantoj de la homoj kaj de la homa gento, montrante al la blindigita, erariranta kaj terligita homaro la ĝustan vojon, kiun ĝi iru.

La gvidantoj en ĉiuj kampoj de la kultura vivo ĉiam estis idealistoj, la vorto prenita en tiu signifo, ke ili havis ian specon de idealo kiel gvidstelon en sia agado. Neniam ia valoro estas kreita antaŭ ol unue preni formon de idealo en la interna vido de la kreinto.

Dum iliaj klopodoj atingi la celon la idealistoj tamen multfoje estas konsiderataj kiel stranguloj, pri kiuj oni komence ne interesiĝas, aŭ kiujn oni kompate aŭ malŝate rigardas desupre, ridetante pri ili. La sekvanta fazo en la historio de tiuj antaŭirantoj estas, ke oni mokas, blas-

femas kaj en diversaj manieroj kontraŭagas, ĉe mortigas ilin. Goethe diras en "Faŭsto" pri tiaj antaŭirantoj:

> "Die wenigen, die was davon erkannt,
> Die töricht g'nug ihr volles Herz nicht wahrten,
> Dem Pöbel ihr Gefühl, ihr Schauen offenbarten,
> Hat man von je gekreuzigt und verbrannt."

En libera traduko:

> "Tiujn malmultajn, kiuj iom pli ol la aliaj sciis
> kaj, sufiĉe malsaĝe, siajn plenajn korojn ne gardis
> sed al la popolaĉo siajn sentojn kaj viziojn malkaŝis,
> tiujn oni tradicie ĉiam krucumis kaj bruligis."

Tiu periodo en la homa vivo, kiam oni plej vigle kaj varme serĉas idealojn, estas la junaĝo. Tio estas ankaŭ la periodo, kiam la homo plej forte bezonas ilin. Dum tiu tempo la karaktero estas formata, la vivkutimoj fundamentataj kaj la estonto konstruata. Pro tio sekve estas grave, ke la idealoj de la gejunuloj estas valoraj. Tio, kio estas grandioza kaj heroa, kortuŝas nin ĉiam, levas nian rigardon kaj varmigas nian senton. Tio precipe koncernas la junularon, al kiu apartenas la estonto.

Ĉar estas tiel, estas ankaŭ pruvite, kiom grandegan respondecon pri la junularo havas la pli aĝa generacio. Se la pli aĝa generacio mem estus pli idealisma kaj direktata de sublimaj kaj grandaj idealoj, la juna generacio certe sekvus ĝin, kaj iom post iom oni vidus pli bonan mondon ol la nunan. Sed bedaŭrinde ne estas tiel.

La konkludo, al kiu ni sekve venas, estas, ke idealoj kaj idealismo estas nepre necesaj kaj por la individuo kaj por la homaro. Same nature kaj necese kiel tio, ke ŝipo en nokta mallumo kaj nebulo bezonas lumturon por atingi sian celon, same nature kaj necese estas ankaŭ tio, ke la homaro kaj precipe la gejunuloj bezonas idealojn por sekvi, por ke ili ne eraru dum sia migrado tra la vivo. Sen idealoj por sekvi la vojo kondukas malsupren en mallumon. La idealo estas stelo, kiu gvidas nin, lumturo, kiu lumas al ni, fajro, kiu varmigas nin, kaj forto, kiu spronas nin, ĝis la celo estas atingita.



# Labormetodoj de studrondoj

De KARL SÖDERBERG

*Tiu ĉi artikolo estas prelego farita en la Somera Universitato 1953. La grupaj studmetodoj certe estas pli malpli konataj de preskaŭ ĉiuj esperantistoj. Malgraŭ tio estas saĝe tre atente legi la artikolon. Ĝi memorigas pri multe da objektoj, kiujn ni plej ofte ne utiligis en nia movado. Ekzistas ja grupa studlaboro kaj koresponda studado. Sed kiom pli povus esti! Grupo por legado, konversacio kaj diskutado povas troviĝi ĉie, kie ekzistas almenaŭ du esperantistoj, kaj cetere ĉiu grupo povas trovi studformon, kiu bone konvenas al ĝi. — Red.*

La unua sveda studrondo estis fondata en Lund en la jaro 1902. Per tio nova studformo estis enkondukata en la liberan kaj propravolan klerigan laboron, studformo, kiu baldaŭ montriĝis ankoraŭ pli praktika kaj adaptebla ol la ĝistiamaj ĉefaj branĉoj: prelegoj kaj bibliotekoj. La iniciatanto estis Oscar Olsson, pli malfrue estro de la bontemplana mondorganizo kaj bone konata en parlamentaj rondoj sub la nomo "Olsson kun la barbo". Lia intenco estis krei kamaradan rondon kun la libro kiel centro. La studrondo ne havu karakteron de lernejo aŭ asocio kun rigidaj formoj sed estu intima amika rondo kun sento de hejmeco kaj solidareco.

En tiun liberan formon oni enmetu valoran enhavon: la ĉefa celo estis doni al la partoprenantoj kaj sciojn kaj socian spiriton. Flanke de la laborista batalo por politika kaj industria demokratio, t. e. kuna influo super administro kaj produktado, devus okazi la anima liberiĝo de la laboristoj aŭ alivorte la penado por kultura demokratio. La trezoroj de nia kulturo estas tiel riĉaj, ke ili facile sufiĉas por ĉiuj civitanoj, kaj se ili fariĝus akireblaj por pli grandaj grupoj de la popolo, la vivo de tiuj grupoj estus pli riĉa je enhavo. Olsson sekve kredis, ke la kleriga laboro povos kunhelpi al egaligo inter la diversaj sociaj tavoloj.

Se la libertempo estas limigita, estas necese uzi raciajn studmetodojn. Eble la studado en soleco, la persona alproprigo, donas la plej grandan rezulton. Nur duope kun aŭtoro oni tute konatiĝas kun li kaj liaj pensoj. Sed —

kaj tio estas grava sed — ni ordinaraj homoj ne majstras ĉiujn regionojn de la homa vivo, kiujn la verkistoj pritraktas en siaj libroj. Ni bezonas komparon kaj renkonton de niaj impresoj kun tiuj de aliaj homoj. La studrondo en ĝiaj plej altkvalitaj formoj estas ideala kombino de memstudado kaj interŝanĝo de pensoj.

La plej simpla formo de studrondo estas la *interŝanĝa rondo*. Verdire ĝi ne estas *stud*rondo sed nur formo de kooperativa havigo de libroj.

Iom pli kvalifikita estas la *legrondo aŭ laŭtlegadrondo*: la partoprenantoj kolektiĝas por alterne laŭtlegi unu por la aliaj. Tia rondo senescepte baldaŭ fariĝas *konversacia aŭ diskuta rondo*. Tio signifas, ke oni post la laŭtlegado interparolas pri tio, kion oni jus aŭdis. Por ne timigi la komencantojn oni devas konversacii simple kaj nature kaj ne laŭ strikte parlamentaj metodoj. Pli malpli frue oni trovas, ke la studado progresas tro malrapide, kaj oni transiras al la plej kutima kaj eble plej efektiva formo de studrondo, kiu estas

la *referat- aŭ prelegrondo*. Ĝia organizo ĝenerale estas jena: Ĉiu partoprenanto havas propran ekzempleron de tiu libro — ni povas nomi ĝin "gvidlibro" — kiu donas la esencon de la studata temo. Por ĉiu kunveno oni elektas almenaŭ du personojn kiel "raportantojn" kaj "opoziciantojn". Ili studos la t. n. "fontlibrojn", t. e. la specialan literaturon pri tiu parto de la studtemo, kiu estos pritraktata la proksiman fojon. Laŭ mia opinio la raportanto kaj la opozicianto devas disponi nur la samajn librojn, ĉar tio sendube reciproke stimulas ilin al ĉiuflanka enpenetro en la temon por eviti kritikon. Bone ankaŭ estas, ke la opozicianto jam antaŭ la kunveno konas la ĉefajn punktojn de la referato.

En la kunveno la raportanto unue donas resumon de la koncerna parto, kaj poste la opozicianto faras siajn komentojn. Poste sekvas ĝenerala diskuto, dum kiu la rondanoj komunikas siajn vidpunktojn, kaj fine la gvidanto de la rondo resumas la rezultojn, kunligas kun parencaj sed ne menciitaj problemoj ktp. La diskutadon devas karakte-



rizi libera kaj senafekta tono sen formalismo, sed por ke ne multaj parolu samtempe estas konvene elekti prezidanton por la kunveno. Eventuale oni ankaŭ povas havi sekretarion, kiu notas ĉion gravan dum la diskuto sed ne la nomojn de la parolantoj, kaj je la komenco de la venonta kunveno tiu protokolo estos laŭtlegata por aktualigi la situacion. Tiuj postenoj kiel prezidanto kaj sekretario de kunveno kun avantaĝo povas cirkuli inter la partoprenantoj.

Speciala formo de tiu rondo estas la *esplorada rondo*. En ĝi la membroj estas dividitaj en du grupojn, el kiuj unu dum privataj kunvenoj kolektas argumentojn por kaj la alia sammaniere kolektas argumentojn kontraŭ certa opinio aŭ pozicio. La grupoj elektas ĉefparoladantojn, kiuj en la plenkunsidoj enkondukas la debaton el la kontraŭaj vidpunktoj. Tiu formo de studrondo povas esti uzata ekzemple pri tia temo kiel la dogana aŭ la helplingva problemo.

Fine mi volas mencii la *lekcian aŭ kursan studrondon*, kiu ekhavis sian nomon pro tio, ke oni en ĝi studas la saman temon dum longa tempo, almenaŭ unu laborsezonon. Kompreneble multaj studfakoj bezonas tiel longan tempon, por ke la rezulto estu kontentiga: lingvoj, politika ekonomio kaj similaj. Oni tamen ne devas troigi; mi aŭdis pri psikologia studrondo, kiu studadis la saman temon dum dek ok studperiodoj. Tio ŝajnas al mi esti malbona ekonomio pri la mallonga libertempo.

Koncerne tiajn longdaŭrajn studojn estas tre necese, ke ili estas laŭmetode farataj, kaj pro tio oni bezonas *studplanon*, aŭ presitan aŭ ellaboritan de la gvidanto. Kontentiga studplano devas plenumi jenajn postulojn: 1. La kampo de la studado devas esti klare limigita (studronda laboro pli celas al profundo ol al larĝo), kaj ĝi devas konveni al la antaŭscioj de la partoprenantoj (estas bone, ke studado streĉas la fortojn sed tamen ne super la kapablo). 2. La elektitan studobjekton oni devas dividi en ĝustamezurajn partojn por ĉiu aparta kunveno. 3. La studplano enhavu informojn pri la koncerna literaturo, inkluzive even-

tualan belliteraturon, pri konvena labormetodo (ne estas eble labori laŭ ŝablono, ĉar la studmaniero varias laŭ diversaj fakoj: lingvoj, komunuma scienco, hejma ekipado ktp), pri la kalkulita nombro de rondokunsidoj (oni ja povas paroli pri Strindberg dum 100 horoj, 10 horoj aŭ 10 minutoj). Krome bona studplano prezentas specialajn labortaskojn por ĉiu kunveno, detalproblemojn por diskutado kaj konvenajn temojn por memstaraj prelegoj kaj traktaĵoj.

Pri ĉiuj diversaj tipoj de studrondoj, kiujn mi menciis, oni povas diri, ke estas dezirinde havi fakulon kiel i n s t r u i s t o n. Precipe estas tiel en rondoj pri praktikaj temoj, kiel la sveda lingvo, matematiko kaj fremdaj lingvoj. Ofte tamen instruisto ne estas havebla en la loko, sed tiu cirkonstanco absolute ne pravigas, ke oni ne komencas studrondon, pri kiu troviĝas intereso. Se nur ekzistas intereso, la studantoj povas helpi al si sen instruisto, sed estas bone, ke ili havas bonan gvidanton de la rondo. Cetere: rondogvidanton oni bezonas, ankaŭ se oni havas instruiston, sed tiuokaze li nur prizorgu la praktikajn aferojn: ejon, kotizojn, raportadon ktp. Sed rondo s e n instruisto devas havi ne nur tian r o n d o gvidanton sed veran s t u d gvidanton, kiu kompreneble povas esti la sama persono, se li nur havas la necesajn kvalifikojn por ambaŭ taskoj.

Kion oni do rajtas postuli de bona s t u d g v i d a n t o? Memkompreneble la postuloj ne estas la samaj por diversaj studtemoj, kaj ili ankaŭ varias inter unuflanke urboj kaj industrilokoj kaj aliflanke la kamparo. Sed mi provos doni certan imagon pri tiuj kvalitoj, kiujn laŭ mia konvinko devas posedi ideala studgvidanto.

Li — aŭ ŝi! — interesiĝu pri la tasko kaj prefere ankaŭ pri la studobjekto; forta studemo ja estas granda pluso. Li estu fidinda, zorgema kaj persista kaj ne laciĝu. Li devas esti optimisto, kiu povas forsugestii la laciĝon kaj pesimismon de siaj kamaradoj, por ke li sukcesu kunteni la rondon dum la tuta studsezono. Same kiel prezidanto de societo ankaŭ la studgvidanto estu tiu membro, kiu venas



unue kaj foriras laste. Li preparu la studadon; ne estas necese, ke li legas pli da libroj ol la aliaj, sed li anticipe orientas sin en la aktuala literaturo per helpo de studplanoj, literaturlistoj kaj similaj helpiloj. Li devas esti almenaŭ unu kunvenon antaŭ siaj samrondanoj. Dank' al sia antaŭorientiĝo li ekkonas la limojn de la ĝuste pritraktota regiono kaj tiamaniere povas eviti tro grandajn deflankiĝojn de la temo. Tiun tempon, kiun li oferas, ŝparas la tuta rondo.

La studgvidanto respondas pri la disdonado de la labortaskoj al la membroj, kaj li donas necesajn informojn. Estas lia devo sen granda bruo kontroli, ke ĉiu membro aktive laboras kaj ne nur pasive akceptas la studrezultojn de la aliaj. Li ne diru multajn vortojn dum la diskutado, sed se necese li intervenu por bridi babilulojn kaj paroligi silentulojn.

Nu, mi ne parolu plu pri la studgvidanto. Mi nur resume volas diri, ke la gvidanto ofte ludas almenaŭ same gravan rolon por la rezulto de la studlaboro kiel ĉiuj aliaj partoprenantoj kune.

Se oni estas tiel feliĉa, ke oni sukcesas havigi fakulon kiel instruiston, li kompreneble havas la samajn taskojn, kiujn mi menciis por la studgvidanto, sed dank' al sia faka sperto li povas pli bone kaj efektive gvidi. Li ne devas esti nura prelegisto — se li faras paroladon, ĝi ĉiam estu sekvata de diskuto, kaj la aŭskultantoj devas havi permeson interrompi kiam ajn por fari demandojn aŭ eventuale aldonojn.

Estas fakto, ke la instruista problemo ofte estas malfacile solvebla, sed plej ofte la malfacilaĵo tamen estas venkebla. Se temas pri lernejaj fakoj, la popolinstruistoj ĝenerale estas pretaj por kunhelpo. Tiu korporacio vere meritas grandan rekonon por ĉiama volonteco koncerne la klerigan laboron. Plue oni povas eluzi la kompetenton de inĝenieroj en teknikaj fakoj, de komunumaj spertuloj pri sociaj problemoj, de pastroj pri filozofio kaj psikologio ktp. Kaj fine oni ja havas grandan aron da memlernintoj, aŭtodidaktoj, al kiuj mi inter alie kalkulas la disĉiplojn de po-

polaj altlernejoj. Feliĉe ne estas necese havi profesoran kompetenton por gvidi studrondon, sed foje ankaŭ estas eble utiligi profesorojn. Mi pensas pri la t. n. universitataj studrondoj, kiuj estas aranĝataj en kunlaboro kun la prelegperejoj de la universitatoj kaj altlernejoj, kaj kiuj estas gvidataj de profesoroj kaj docentoj aŭ kun ili komparindaj personoj.

Kelkfoje du aŭ pluraj studrondoj en la sama urbo kaj kun la sama studfako kunlaboras tiamaniere, ke ili kunvenas kune ĉiun duan semajnon, kiam fakulo prelegas, kaj krome ili kunvenas unuope la interajn semajnojn por diskutado. Tiu studformo, kiun oni baptis "grupronda kurso", ŝajnas esti konvena en grandaj lokoj kaj pri teoriaj fakoj, kiel ekonomia scienco, socialismo, aktuala politiko kaj similaj temoj. La gajnoj estas inter alie, ke la metodo estas malkara, ke oni povas eluzi la prelegistojn pli racie, kaj ke tiu aranĝo ebligas pli da vidpunktoj kaj impulsoj.

En tiu ĉi kunteksto mi volas mencii kelkajn specialajn formojn de studrondoj. La unua estas la koresponda rondo. Ĝi donas tion, kion oni nomis la "triopan akordon" de la studrondoj, nome unue memstudadon, due interŝanĝon de ideoj kaj trie kunlaboron kun instruisto. Se oni ne povas havigi instruiston en sia propra loko, fakulo en alia loko estas preta servi. Plej ofte tiuj studrondoj funkcias tiamaniere, ke ĉiu aparta membro tralegas la leteron hejme kaj verkas skriban respondon al la demandoj. Dum la kunveno de la rondo oni diskutas la diversajn problemojn kaj alternativojn, kaj kiam oni interkonsentis pri la plej bonaj respondoj, la sekretario aŭ por ĉiu fojo elektita rondano surpaperigas ilin kaj ensendas la komunan respondon al la instituto por korektado. En la venonta kunveno la respondo kaj la eventuala kritiko de la instruisto estos diskutataj. — Ankaŭ ekzistas aliaj formoj de la koresponda studrondo.

Eble iu el vi apartenis al radia studrondo, kiu ankaŭ estas nomata aŭskultanta grupo. Kiel vi ĉiuj scias, la Radia servo organizas seriojn da prelegoj kaj eldonas specialajn studleterojn kun komentoj kaj labortaskoj. El la variaj temoj dum la lastaj jaroj mi mencias kiel ekzemplojn: Interpopola kunlaboro, Nuntempa sveda laborvivo, Sveda memregado, Psikologio kaj psika higieno, Modernaj svedaj rakontistoj, Kamparano en vilaĝo kaj bieno ktp. La partoprenantoj kolektiĝas en studa ĉambro aŭ en hejmo por aŭskulti la dissendon, kaj poste — prefere alian vesperon — ili kune priparolas la temon, kiu estis pritraktata en la programo.



Fine mi mencias specon de studrondo, kiu eble estas la plej grava kaj necesa de ĉiuj studrondoj. Ĝi estas la gejunula studrondo por knaboj kaj knabinoj dum la malfacilaj transiraj jaroj. Por ke la gejunuloj inter 13 kaj 20 jaroj ne forgesu ĉiujn sciojn de la lerneja tempo, kaj por ke ili evitu malbonan influon de nedezirinda konataro, oni devas kolekti ilin al agrabla, amuza studlaboro, ekz. en la junularaj organizoj. Sveda popollerneja instruisto, kies nomo estas Hernfrid Bark, ellaboris originalan metodon por tiaj gejunulaj studrondoj. Inter alie li proponis, ke oni aranĝu klerigajn ludojn, kiel ekz. la t. n. "genian ludon": la instruisto demandas pri sveda verkisto, kies nomo komencas per la litero H, pri eŭropa urbo, komencanta per E ktp., kaj tiu junulo, kiu sukcesis doni la plej multajn respondojn, ricevas la honoran titolon "genio" por la vespero. Alian fojon oni havas korpan kaj animan deksportan konkurson; tio signifas, ke oni konkuras pri ekz. kvin spiritaj sportoj, kiel geografio, literaturo, kapkalkulado, zoologio kaj historio, kaj pri kvin korpaj sportoj, kiel kurado cent metrojn, naĝado, altsalto, kuglopuŝado kaj biciklado. Per tiu kombino la anime viglaj kaj la fizike fortaj gejunuloj havas la samajn eblecojn respektigi sin. Mi kredas, ke la metodo de Hernfrid Bark, kiun li prezentis en malgranda ABF-a broŝuro, estas bona helpilo por tiu, kiu volas kolekti junajn homojn, kiuj estas nek infanoj nek plenkreskuloj, al kleriga kaj evoluiga laboro.

Fine mi nur volas citi kelkajn liniojn el dekjara raporto de sveda studrondo, kiu sukcesplene studis tre variajn temojn. Aŭskultu: "La unuan jaron ni studis esperanton,

poste matematikon, belliteraturon, la svedan lingvon, la historion de la gazetaro, psikologion kaj la historion de la laborista movado. Krome okazis apartaj prelegoj kaj diskutoj, precipe koncerne la popolklerigan laboron. Sed ankaŭ tiaj problemoj kiel la socialigo, la katolikismo kaj nia tempo ktp. estis pritraktataj. La studrondo ankaŭ aranĝis komunajn vizitojn al teatroj kaj artekspozicioj, dimanĉajn promenadojn, ekskursojn, studvojaĝojn kaj festojn."

Jen malgranda specimenaro el la laborprogramo de tiuj gejunuloj, kaj tamen ĉio tio ne estas ilia plej granda kontribuo al la kultura agado. La studrondo, pri kiu mi parolas, nome estas la bone konata rondo numero 503 de ABF, t. e. tiu grupo de junaj entuziasmuloj, kiu dum 25 jaroj eldonis la klerigan revuon "La Studkamaradon" ("Studiekamraten"). Ĉu oni povus trovi pli belan kaj pli imitindan modelon por aliaj studrondoj ol tiu kultura centro, ol tiuj fervoraj semantoj, kiuj jaron post jaro fordonis siajn vesperojn kaj ofte ankaŭ noktojn en batalo "kontraŭ brutaleco kaj banaleco, por intensa eduka kaj kleriga laboro", kiel diras la vinjeto de la gazeto. Kaj tiu grupo tamen trovis tempon por siaj propraj studoj. Tiom multe oni povas plenumi per bona volo kaj forta energio. Kaj tiom alte ĉiu studrondo devas starigi al si la celon. Eĉ se oni — kiel diras la proverbo — nur trafas la arbarrandon, kvankam oni celis al la ĉielo, jam estas bona gajno, ke oni celis en la ĝusta direkto.

## Kunlaboro

De *TULLA HOLFELT*

Esperanto celas al homfratiĝo, interkompreno, paco.

Tio estas la plej alta celo de la homaro kaj la plej inda.

Kiamaniere ni plej facile kaj plej rapide atingos la celon, ĉu disaj aŭ kune?

Ni scias, ke ni ne multe kapablas unuope. Unuigitaj ni povas transloki montojn. Per tio la respondo estas donita.

Kaj homoj, kiuj vere ion celas, *agas laŭ kompreno kaj racio,*



ĉu ne? Estas tempo pripensi laboron kaj labormanieron en nuno kaj estonto.

La terura milito instruis nin, ke la vojo al interkompreno estas longa kaj dorna. Tamen tiu vojo estas irinda kaj irota. Sen paco estas sensence vivi kaj labori. Dum longa tempo kaj en granda penado ni per kunigitaj fortoj kaj oferoj konstruis belegajn, mirindajn katedralojn, antaŭ kiuj ni sentas nin levitaj super la ĉiutagajn zorgojn, jes, nia animo preĝas, eĉ sen konscia penso pri Dio. Kaj jen niaj bomboj en momento detruas ilin! Ĉu racie? Ĉu ne sensence vivis kaj laboris ĝiaj arkitektoj kaj konstruistoj?

Inter la du svedaj esperantoorganizoj SLEA kaj SEF jam ekzistas kunlaboro, nome en la Esperanto-Instituto. La Instituto servas al la propagando kaj al la ekzamena laboro. Precipe mi ŝatas la klopodon por la ekzamenado. La lernantoj pli bone studas kaj kun pli da ĝojo, kiam ili scias, ke ili povos atingi ateston.

Dise laborantaj en multaj diversaj organizoj ni malŝparas tempon, forton kaj monon. Ni ne perdus ion de nia personeco, se ni kunigus niajn fortojn. Mi ne havas perfektan recepton, sed mi memorigas pri la organiza formo de SAT. Al tiu asocio povas kiu ajn esperantisto aliĝi, kaj en ĝi troviĝas sekcioj por diversaj grupoj, metiistoj ktp. Estas kunlaboro en la grandaj, ĉefaj aferoj, kaj sekcia laboro por la diversaj interesoj.

Simile estas ja ankaŭ IEL organizita.

Ŝajnas al mi, ke SEF kaj SLEA povus rekte kunlabori en multaj gravaj aferoj, ne nur en ĝisnuna amplekso, same kiel diversaj sekcioj en asocio povas kunlabori. Mi esperas, ke la esperantistoj pro la aspirata kaj sopirata komuna celo povas kaj volas meti la proprajn malgrandajn aferojn en la duan vicon.

La konsciaj esperantistoj bone scias, kion celis la fondinto per sia donaco al la homaro. La bonkora okulkuracisto suferis, kiam li vidis, ke la homoj malamas kaj suspektas sin reciproke, pro tio ke ili ne havas eblon interkompreniĝi.

La semo, kiun plantis la majstro antaŭ kvindek kvin jaroj, kreskis ĝis granda arbo kaj staras kun firmaj radikoj en fruktodona tero, kaj la branĉoj etendas sin al ĉiuj kvin mondopartoj. Dependas nun de la ĝardenistoj, la esperantaj organizoj, ĉu la branĉoj harmonie evoluos, tiel ke unu branĉo ne subpremos aŭ malhelpos alian. Ili devas ĉiuj memori, ke ili sin nutras de la sama trunko.

Mi havas la firman kredon, ke ni per kunigitaj fortoj atingos pli rapide kaj pli facile la unue atingindan celon de la esperantistaro: esperanto dua lingvo en ĉiuj lernejoj en la tuta mondo. La gepatra lingvo servos en la hejmlando kaj esperanto kiel interkompreniło en la pli granda hejmlando, la mondo. Laŭ mia penso, tiu celo ne estos atingebla sen kunlaboro en pli granda skalo.

## Pretaj por ofensivo *De ARTUR PERSSON*

Esence internacia kia estas la esperantismo en sia ideo kaj fundamento ĝi nature devas suferi gravajn malhelpojn kaj eĉ ŝancelajn batojn dum epoko kia la nuna, ĉefe karakterizita per la pupiĝo de la internacieco mem. La batoj povas ŝanceli la konstruon, eĉ detrui kelkajn el ĝiaj partoj sed certe ne ĝian fundamenton. Kiel pupo destinita al estonta apero en alia formo tiel atendas la momente kaŝitaj fortoj de la homa spirito, kiuj iam kreis, konstruis, flegis kaj fortigis la esperantan konstruon, la revokon al vivo aktiva, libera kaj aliforma kvankam esence la sama.

Kvindek jaroj donis al ni multe da sperto. Nun estas la ĝusta tempo rerigardi, analizi kaj lerni por nia reapero sur la tutmonda areno. Kion ni faris ĝuste, kion malĝuste? Kion ni reprenu, kion forĵetu? Ĉu ni ne povas konsentiĝi pri tio, ke la postmilita mondo estos tiom transformita, ke ni nepre bezonos liberigi nin de ĉiuj antaŭjuĝoj? Nova aspekto de la internaciaj problemoj postulos zorgan revizion de niaj metodoj. Propagando kaj organizo devos adaptiĝi al aktualaj problemoj.

Dum la sufoka premo de la militaj jaroj stagniĝis ne nur la internacia esperantismo. Ankaŭ la kluba vivo refalis en staton de vegeto. La klubo, la grupo estas la ĉelo de nia organizo, la flegejo de la ideo kaj ĝia ilo. El la ĉeloj devos eliri la soldatoj de la estonta ofensivo. Kaj jen demando tiom al mi kiom al vi: Ĉu la ĉelo povis malhelpi, ke ĝi fermiĝos, izoliĝos? Apenaŭ. Ni kunvenas, ekzerce babilas kelkajn esperantajn vortojn, alparolas unu la alian "Samideano". Ne sufiĉas, tute ne! Por taŭgi kiel soldatoj en la estonta ofensivo ni flegu ne nur nian lingvon sed ankaŭ — kaj eble antaŭ ĉio — nian koncepton pri la esperantismo. Pli valora en la esperanta ofensivo estos batalanto vere komprenanta la rolon de esperanto ol lingve perfekta esperantisto hezitanta pri la ĝusta signifo de la esperantismo. Klubo neniel estas forumo de reciproka admiro, nek nur de koteria amikeco, sed ĝi estu la fonto, la vivtenejo, la



ĝardeno de impulsoj, kies radioj transiros la mondon. Ni malfermu la fenestron kaj rigardu eksteren!

Tio estas la unua kondiĉo por efektiva laboro serve al la ideo de esperanto. Principa kaj ĝenerala kondiĉo. Se ni plene konscias la signifon de tiu kondiĉo, ni estas pretaj por la konkreta agado.

Efektiva propagando postulas taktikon. La moderna homo ŝatas nek arogecon nek falsan idealismon. Li volas havi faktojn, firme bazitajn sur utilo kaj realo. Malmultaj postmilitaj homoj konvertiĝos al esperanto pro difuzaj revoj. Sed multaj venos pro la konvinko, ke esperanto servos la materian prosperon de la homaro. Ni tute ne perdu la kuraĝon pro tio. La ŝajne materialisma koncepto pri utilo anstataŭ idealo signifas nur, ke ni finfine ekkomprenis la neceson trakti la mondon, kia ĝi fakte estas. Kaj idealisto ne estas malpli valora, se li realece agadas. Metodo estas unu afero, celo alia. La konscio pri la celo estas la motoro de la prospero kaj eble eĉ la vera insigno de la idealisto. Finfine nia celo estas tre difinita, ĉu ne? Esperanto al la homaro en la servo de paco kaj fratiĝo, en la servo de evoluo kaj prospero, de ĉies prospero.

*

En Francujo dum kelke da jaroj ĝis la eksplodo de la nuna milito la koncepto pri internacia helplingvo tiom penetris la oficialan vivon de la lando, ke oni rajtas paroli pri nova epoko en la historio de la lingvo. Pro la interveno de la milito malmultaj eksterlandanoj eksciis la faktojn de tiu nepre notinda evoluo, bedaŭrinde rompita per la transiro de paca konstruado al milita konfuzo. Kio okazis?

Ne estas eble en ĉi tiu artikolo redoni eĉ la ĉefajn trajtojn de tiu periodo, kies premisoj cetere aperis iom post iom dum kelkaj jardekoj. Mi skize rakontos nur tion, kion mi persone spertis havante la plezuron aktive partopreni la laboron por esperanto en tiu lando.

Komence de la jaro 1936 mi estis invitata al Besançon, universitata urbo en la departemento Doubs en orienta Francujo, por tie gvidi kursojn en esperanto. Je mia alveno estis en la urbo nur du aŭ tri esperantistoj. Sed parte

de certa organizo, kies celo ĝenerale estis la sama kiel tiu de la esperantismo, parte de la universitata rektoro, sinjoro P., mi trovis ege valoran subtenon por mia laboro, kaj al miaj kursoj aliĝis tuj 230 personoj, el kiuj multaj estis pedagogoj. Sendube estis granda sukceso, sed jam antaŭe ja montriĝis en pluraj lokoj, ke Ĉe-kursoj povas almenaŭ komence allogi grandan kursanaron, kiu post la foriro de la instruisto ofte perdiĝas por la movado. Interkonsente kun la estraro de la Societo Franca por Disvastigo de Esperanto (SFPE) ni decidis fari tute apartan klopodon en Besançon. Kelkaj rutinaj geinstruistoj daŭrigis fervore sian studadon de la lingvo dum la somero, por ke ili kapablu transpreni la gvidon de la kursoj en la aŭtuno. Dumtempe la estraranoj en Paris preparis la terenon ĉe la koncernaj aŭtoritatuloj, kaj fine oni ekhavis la promeson organizi esperantokursojn en tri mezlernejoj en Besançon. Tiu permeso estis rekte donata de la ministro por la nacia edukado. La freŝaj esperantoinstruistoj en Besançon komencis sian laboron, kiu — tion mi devas nun diri — havis tute apartan celon.

Okaze de la mondekspozicio en Paris 1937 la francaj esperantistoj invitis al speciala scienca kaj pedagogia konferenco, kiu devis okazi en la frusomero. Interkonsente kun la ministrejo de la nacia eduko "oficiala eksperimento" pri la taŭgeco de esperanto estis aranĝota tiamaniere, ke dek el la partoprenantoj de la menciitaj kursoj en Besançon, knaboj kaj knabinoj en la aĝo 14—18 jaroj, estos publike ekzamenataj dum la konferenco. Memorinde estas ke la instruantoj de tiuj kursanoj tute nenion sciis pri esperanto 14 monatojn antaŭ la eksperimento, kaj ke la ekzamenotoj mem studis la lingvon dum nur kelkaj monatoj 2—3 horojn en ĉiu semajno.

Mi ne scias, kiom da signifo la ministrejo atribuis al la eksperimento. Eble ĝi estis nura formalaĵo. Sed tio per si mem ne gravas. Pli grava estis la oficiala raporto donita al la ministro de rektoro P., kiu prezidis la ekzamenon kaj cetere sekvis la kursojn kun granda intereso. La raporto estas pro ĝia oficiala karaktero tiom pro ĝia al esperanto tre favora enhavo sufiĉe unika dokumento en nia historio.

Nun necesas aldoni ke samtempe kun tiu oficiala eksperimento la francaj esperantistoj faris larĝan ofensivon sur preskaŭ ĉiu tereno de la oficiala vivo. Kaj sekvis vere konsiderindaj rezultoj. La kursoj de Besançon daŭris ĝis la eksplodo de la milito. De 1937 mi mem gvidis kursojn en seminarioj por instruistoj en Vesoul, Lons-le-Saunier kaj Grenoble, en seminarioj por instruistinoj en Lons-le-Saunier kaj Grenoble kaj en liceoj en Fontarlier kaj Lons-le-Saunier. Kiel ekzemplon de la graveco de la nova pozicio, kiun atingis la lingvo dum tiu periodo, mi povas mencii, ke la rektoro ĉe la universitato de Besançon havis apartan registradon de la esperantaj dokumentoj, tute oficialan, same kiel por ĉiu parta fakultato.

Malgraŭ la terura bato, kiun kaŭzis la milito al la franca popolo, mi firme kredas, ke la pozicio de la esperantismo atingita en 1939 estis tiom forta, ke reviglîĝo estos ebla ne tro malfrue post la milito.

Per la mencio de la francaj cirkonstancoj mi celis montri imitindan taktikon kaj samtempe rezulton, kiu povas esti instigo al ĉiu esperantisto en malhela nuntempo.

## Ĉu vi malvarmumas, Jakobo?

**De *MARTIN PERSSON***

(La rakontoj estas el la paroĥo Norrbärke.)

Antaŭ ol gazetoj venis al la vilaĝoj kaj radio fariĝis necesa posedaĵo, la buŝa komunikmaniero sola anstataŭis la nuntempajn novaĵperilojn. Sed ĝi servis ne nur por perado de novaĵoj. En la vilaĝoj la najbaroj kolektiĝis vespere en jen unu jen alia domo nur por babili.

Oni babilis pri kio ajn sed ĉefe pri aferoj, kiuj koncernis la vilaĝon kaj la tagan laboron. La junaj sidis streĉe aŭskultantaj, kiam maljunulo rakontis pri propraj travivaĵoj aŭ redonis fabe-

lojn kaj strangajn travivaĵojn, kiujn en lia junaĝo rakontis al li tiutempaj grizharuloj.

Tiel oni en pasinta tempo jam de infanaĝo lernis rakonti kaj lernis aŭskultadi, du gravaj sed hodiaŭ neoftaj kvalitoj.

Okdekkvin-jarulo en suda Dalekarlio rakontis al mi la ĉi-subajn aferojn. Li naskiĝis en soleca vilaĝo kaj vivis ĉiam en la sama regiono. Mi vizitis lin pasintsomere en vespera horo. Li ne estis en la lito, kiel mi timis, kaj eĉ ne en la domo sed laboris en la lignaĵejo.

Fininte sian laboron li tuj estis preta rakonti kelkajn historiojn. Ĉu ili estas veraj aŭ ne, mi ne scias. Ĉion li rakontis tute serioze. Li ne intencе fabelas, tion mi scias. Se ne ĉio estas kredinda — memoru, ke li havas okdek jarojn kaj ne estas same moderne racia kiel nuntempa juna homo.

Unue li parolis pri lokaj saĝuloj, kiuj vivis en lia infanaĝo. Jene li rakontis al mi en la vespero, kiam ni sidis sur lia ligna sofo, kaj liaj genepoj atente aŭskultis, kaj la krepusko ekster la malaltaj fenestroj iom post iom densiĝis.

"Dalkarls-Olle estis konata saĝulo, kun kiu mi foje babilis. Li povis kuraci homojn kaj bestojn. El libro skribita per ruĝa inko li estis lerninta sian eminentan kuracpovon. —

Ankaŭ Per Olsson estis viro, kiu en diversaj aferoj sciis pli multe ol ordinaraj homoj. En sia infanaĝo li estis kaptata de monstroj kaj logata en la internon de monto, kie li devis resti dum pluraj jaroj. Fine la montomonstroj liberigis lin kaj lasis lin reiri al sia hejmo. Post tio li povis fari diversajn sorĉojn.

Virino, kiu havis tre doloran ŝveltuberon sur sia genuo, konsultis lin. Li promesis helpi ŝin. 'Vi devas', li diris al la virino, 'nepre teni la pordon de via domo fermita la tutan vesperon ĝis noktomezo, kaj la genuo denove fariĝos bona.' Sed vespere najbaro vizitis la virinon, kaj senpripense ŝi lasis lin eniri tra la pordo. Preskaŭ tuj atakis ŝin terura doloro en la genuo, kaj tiom ŝi estis turmentata, ke ŝi mem kredis, ke ŝi ne travivos. Frumatene la sekvantan tagon venis al ŝi Per Olsson kaj kolerĉagrene riproĉis ŝin pro tio, ke ŝi enlasis vizitanton. 'Tio estus povinta kosti vian vivon same kiel la mian', li diris. 'Hodiaŭ vespere', li daŭrigis, 'vi nepre atentu, ke la pordo restos fermita. Se iu ĝin malfermos, mi ne povos respondi pri la sekvoj.' En tiu vespero la pordo restis fermita ĝis noktomezo. Tuj poste ĉesis la doloro, kaj la ŝveltubero krevis." —

"Nun mi rakontos al vi pri Hufstjärns-Jakob", daŭrigis la maljunulo. "Li venis ĉi tien de sude kaj ekloĝis en la najbaraĵo de Larsbo. Komence oni sciis nenion pri lia pasinto. Li evitis siajn najbarojn kaj restis dum longa tempo fremdulo por ĉiuj en la regiono. La mistero ĉirkaŭ li tamen solviĝis. Famo el la sudo



rakontis, ke li iam terure batis viron. Kredante, ke li mortbatis lin, li rifuĝis norden.

Iun tagon venis kampara polichelpanto al la kabano de Jakob kaj senceremonie arestis lin. En la arestejo li devis resti plurajn semajnojn. Iun tagon li petis siajn gardantojn pri permeso viziti sian hejmon en Hufstjärn, ĉar li volas rigardi, ĉu la sekalo kreskas bone sur la kampoj. Oni kondukis Jakobon al lia hejmo. Ĉar li bone kondutis kaj ĉiam obeis al siaj gardantoj, tiuj por momento eĉ iris en la domon, dum Jakobo staris en pensoj ĉe la sekalkampo. Kiam li trovis sin sola, li rapide agis laŭ sia elkalkulo. Per kelkaj kurpaŝoj li atingis la lageton Hufstjärn, saltis en la akvon kaj tiel dronigis sin.

En tiu tempo estis kutimo, ke oni veturigis la kadavron de sinmortiginto tra la vilaĝoj en la regiono. Tio estu averto por aliaj homoj. Tiel oni traktis ankaŭ la kadavron de Hufstjärns-Jakob. La transporton oni komisiis al loka originalulo. Ofte dum la veturigo oni deprenis la kovrilon de la ĉerko, kaj miroplenaj okuloj rigardis la mortinton. Kiam li kun sia stranga ŝarĝo haltis en la vilaĝoj, li ofte estis regalata per brando. Elirinte post tia regalo li en sia ebrio kredis, ke Jakobo vivas, kaj demandis: 'Ĉu vi malvarmumas, Jakobo?'

Ĉar Jakobo memmortigis sin, oni ne povis meti lin en sanktigitan teron. Oni senceremonie ĵetis lian korpon en solecan, forlasitan mintruon. Unu el la viroj, kiuj ĉeestis la strangan entombigon, krude mokis la mortinton. Tuj li ricevis tiel fortan vangofrapon, ke li preskaŭ ne povis resti sur la piedoj. Li sentis la pugnon, sed li vidis, ke neniu el la kamaradoj batis. —

Certe Hufstjärns-Jakob ne estis tiel malbona, kiel opiniis la homoj", komentis la maljunulo. —

"Se vi volas ekscii pri okazo ĉe somerpaŝtejo ne malproksime de tie ĉi, mi povas tion rakonti al vi, kiel oni rakontis al mi en mia infanaĝo", li daŭrigis. "En soleca somerpaŝtejo en la arbaro loĝis knabino el nia regiono. Ŝi estis sola. Iun malhelan vesperon venis dek du rabistoj por ŝteli la brutojn kaj mortigi la knabinon. Sed tiu knabino estis brava. Kiam la rabistoj venis en la kabanon kaj tuj volis mortigi ŝin, ŝi ne konsterniĝis sed kuraĝe demandis ilin, ĉu ŝi rajtas iri sur la tegmenton de la kabano kaj tie ludi melodion per sia paŝtista korno, antaŭ ol ŝi estos mortigata. La knabino estis tiel bela kaj petis tiel kortuŝe, ke la rabistoj cedis. Ŝi rampis sur la tegmenton kaj ludis la sekvantan kanton:

Dekdu viroj ili estas,
dekdu glavojn ili portas,
la grandbovon ili buĉis,
la hundon ili mortpafis,
kaj min ili volas mortigi.

En proksima vilaĝo oni aŭdis la ludon kaj ankaŭ distingis la vortojn de la kanto. Senprokraste la viroj en la vilaĝo rapidis al la somerpaŝtejo kaj sukcesis kapti la rabistojn en la momento, kiam ili estis mortigontaj la knabinon.* —

Antaŭ longa tempo vivis viro, kiun oni nomis Grand-ŝtelisto. Li ofte ŝtelis bovinojn en somerpaŝtejoj.

Iu knabino en tia paŝtejo estis vizitinta najbaran vilaĝon. Kiam ŝi revenis al sia soleca arbara loko, ŝi ekvidis Grandŝteliston, kiu ĝuste provis eniri en la brutejon. Ŝi estis sentima kaj senkaŝe iris al la ŝtelisto, pensante, ke li forkuros. Sed tiu kaptis la knabinon per siaj fortaj brakoj kaj portis ŝin en la arbaron. Tie li enpremis la knabinon, kun ŝia kapo antaŭe, en grandegan formikstakon, kie ŝi malrapide sufokiĝis.

Fine la Grandŝtelisto estis kaptata. Tio okazis jene. Li foje invitis najbarojn al sia hejmo. Regalinte siajn gastojn per brando li paŝis al granda, malnova kesto, murmurante, ke nun oni manĝu kaj estu gaja. La kesto estis tute plena de sangaj viandopecoj, grasaj bovidfemuroj kaj aliaj bonaj viandaĵoj. La pli ebriaj el la gastoj nenion suspektis, sed la aliaj komprenis, ke ĉio estas ŝtelita.

Post la regalo oni avertis policHelpanton, kiu tuj venis al la hejmo de la Grandŝtelisto kaj esploris liajn kaŝejojn. Dume la Grandŝtelisto malaperis kaj rifuĝis norden tra la arbaroj. La polichelpanto kaj kelkaj aliaj viroj fine trovis lin en somerpaŝteja kabano. Sed antaŭ ol tiuj sukcesis kapti lin, li rapide prenis el sia veŝtpoŝo venenglobeton, kiun li glutis. Post teruraj turmentoj li mortis.

La Grandŝtelisto havis kompatindan edzinon, kiu post lia morto rakontis terurajn aferojn, ekzemple pri tiu knabino, kiun li mortigis en la formikstako. Ŝi rakontis ankaŭ, ke li kutimis ŝteli karbon ĉe la karbigejoj en la arbaro. Tiam li per rastilo rastis en la karbogruzo, por ke aspektu, kvazaŭ vulpoj estus tretintaj sur la karbojn." —

Silento regas. La maljunulo sidas en la sofangulo kvazaŭ ne konscia pri ni ceteraj. Li ŝajne revivas foran tempon, kiu tre malsimilas al nia, tempon, kiam homoj ankoraŭ ne klare distingis limon inter superstiĉo kaj realo. Mem mi pensas pri tio, kion li rakontis. Ĉu vere ĉio tio okazis? Kaj malgraŭ ĉio — ĉu la nuntempaj homoj estas pli kulturitaj?

*) Tiu ĉi rakonto troviĝas ja ankaŭ en aliaj regionoj.



# La branĉetoj

De STELLAN ENGHOLM

Avino venis hejmen kun fasko da betulaj branĉetoj sur la brako. Ŝi sidigis sin sur unu el la peronaj ŝtupoj kaj komencis fari balailon.

— Kial oni tiel traktas nin? plendis la branĉetoj.

— Tion vi baldaŭ vidos, diris la kato, kiu sidis apud avino. Vi faros utilon.

— Kio estas utilo? demandis la branĉetoj. Ĉu ni balanciĝos en la vento kaj faros novajn foliojn?

— Certe ne, diris la kato. Utilo estas tute alia afero. Sed baldaŭ vi mem spertos.

Kiam la balailo estis preta, avino portis ĝin al la lignejo kaj metis ĝin en angulon, kie staris fosiloj, forkoj, rastiloj kaj aliaj ĝardenaj laboriloj.

— Kio okazos al ni? Kio estas fari utilon? demandis la branĉetoj.

— Kiu tiel ĝenas nin, kiam ni volas ripozi post nia labora sezono? gruntis fosilo. Oho, vi estas balailo. Vi estas utila estaĵo kaj honeste vivtenas vin. Estu bonvena al nia bona societo!

— Dankon! diris la branĉetoj. Sed ni nenion scias pri utilo. Kion ni faros?

— Estas stranga balailo, kiu ne scias, kio estas fari utilon, diris la fosilo. Aha, vi estas tute nova, tio klarigas la aferon.

Kaj la fosilo klarigis, kio estas utilo.

— Pri tiaj aferoj ni ne povas okupi nin, diris la branĉetoj. Ni havas multe da malgrandaj burĝonoj, kiuj estas plenaj de nova vivo. Ni nun devas dormi, sed kiam revenos la suno, ni devos fari novajn foliojn kaj novan odoron, ni devos kreski kaj balanciĝi kaj susuri en la vento kaj akcepti la birdojn, kiam ili revenos.

— Vere vi estas tute nova, diris la fosilo. Honesta utila objekto ne havas tiajn fantaziojn. Ĝi estas el seka ligno kaj malmola fero, kaj ĝi havas racion sed ne fantazion. La senco de nia vivo estas esti utilaj, ripozi kaj denove esti utilaj. Ĉu la vivo povas havi alian sencon? Nu, baldaŭ vi fariĝos prudenta. Sed nun ni dormu!

La fosilo eksilentis, sed anstataŭe neĝoŝovelilo komencis paroli.

— Vi estos kamarado kun mi, ĝi diras, ĉar vi estas neĝobalailo.

— Ni ne estas neĝobalailo, protestis la branĉetoj. Ni estas betulaj branĉetoj, kaj kiam venos printempo, ni faros novajn foliojn.

La ŝovelilo ne atentis pri tio sed daŭrigis:

— Ni esperu, ke venos malmulte da neĝo, ĉar tiam ni ne be-

zonos multe labori, sed povos dormeti kaj havi bonajn tagojn. Nenio urĝas nin.

Kiam venis la unua neĝo, la mastro en la domo prenis la balailon kaj enŝovis en ĝi longan bastonon, por ke oni havu bonan tenilon, kiam oni balaos. Kaj poste oni komencis tuj uzi ĝin.

Post farita laboro oni metis la balailon en angulon de la perono. Kiam ĝi staris tie, venis la kato.

— Ho, jen vi revenis, ĝi diris. Estas bone, ke vi faras vojon por mi. Mi ne ŝatas iri en profunda neĝo. Kaj nun vi do scias, kio estas fari utilon.

— Estas malagrabla vivmaniero, diris la branĉetoj. Baldaŭ venos la tempo, kiam ni devos eligi burĝonojn kaj fari novajn foliojn. Sed nun niaj pintoj difektiĝis de frotado, kaj ni eĉ perdis kelkajn burĝonojn.

— Lasu tiajn revojn, kamarado! diris la neĝoŝovelilo, kiu staris apud la balailo. Fari tion, kio estas nepre necesa, ne foruzi tro rapide sian forton kaj ne maltrankviligi sin per stultaj ideoj pri burĝonoj aŭ pri grava utilo — tio estas la plej bona maniero por vivi. Ni esperu, ke ne venos tro multe da neĝo!

Sed multe da neĝo venis. La ŝovelilo ne suferis rimarkeble de tio, ĉar ĝi estis fortika, sed la balailo aspektis mizera pro ĉiutaga uzado. La ŝelo sur la pintoj de la branĉetoj estis forfrotita, kaj multaj el la branĉetoj estis rompitaj.

Fine venis tempo, kiam la suno denove iris supren sur la ĉielo, la neĝo komencis degeli, mildaj ventoj venis el sudo.

En iu lunbrila nokto la kato iris promeni. Sur la perono ĝi haltis por kelkaj momentoj kaj babilis kun la balailo.

— Vere vi nun scias, kio estas fari utilon, ĝi diris. Tre malbone oni traktis vin.

— En tiaj noktoj la bonaj ventoj balancis nin sub la luno kaj la steloj, diris la branĉetoj. Nokta malseko donis antaŭsenton de printempa pluvo, kaj frue en la matenoj la suno karesis nin, kaj niaj burĝonoj komencis ŝveli.

— Jes, estas dolĉa tempo, diris la kato.

— Estas preskaŭ hontinde, ke vi ankoraŭ havas tiajn naivajn revojn, diris la neĝoŝovelilo. Vi faris multe da utilo kaj aspektas preskaŭ eluzita. Ĝoju, ke vi nun povas ripozi!

— Kaj ankaŭ nun ni sentas, ke ni devus fari foliojn kaj florojn kaj krei bonan odoron. Sed ni ne povas plu. Tamen ni scias kaj sentas tion, kio nun okazas en ĉiuj branĉoj sur la arboj. Estas granda miraklo.

La printempo pli proksimiĝis. La lasta neĝo degelis, la tero sekiĝis, kaj oni komencis uzi la balailon por purigi la korton. Tiam la branĉetoj rapide eluziĝis, kaj ĝi aspektis tre mizera.

Iun tagon venis la fosilo el la lignejo, kune kun la rastilo.



— Ho, jen estas vi, ĝi diris, kiam ĝi renkontis la balailon. Bonan printempon! Estas agrable denove veni en freŝan aeron por entrepreni ion utilan. Ho jes, vi jam faris la vian, mi vidas. Sed vi honeste plenumis vian taskon kaj povas nun ripozi kun trankvila konscienco. Vi povas senti vin kontenta.

— Nun estas tempo por burĝonoj kaj folioj, diris la branĉetoj. Sed ni estas rompitaj kaj eluzitaj.

Apude staris grosarbusto, kiu jam eligis belajn verdajn foliojn kun forta, agrabla odoro.

— Estas bedaŭrinde, ke tia sorto trafis vin, ĝi diris. Sed oni devas havi pikilojn por defendi sin.

Sur unu el la ĝardenaj bedoj kuŝis stako de branĉoj kaj diversa rubo. Sur ĝin oni ĵetis ankaŭ la balailon. Sed la tenilon oni eltiris kaj remetis en la lignejon.

En la branĉostako la branĉetoj de la balailo unuafoje renkontis iun, kiu plene komprenis ilin. Estis la kristnaska arbeto. Ĝin oni eljetis jam en januaro, kaj ĝi estis kvazaŭ la fundamento kaj kerno de la amaso. Ĉiaj supraj branĉoj estis liberaj, sed ili estis nur malgajimpresa skeleto de junarbo.

— Ĉu ankaŭ vi devis fari utilon? demandis la branĉetoj.

— Ho ne, mi devis fari plezuron, diris la arbeto.

— Ĉu plezuron? Do vi estis pli feliĉa ol ni.

— Estis malmulte da plezuro por mi. Meze en la vintro mi vekiĝis kaj trovis, ke oni forhakis min de mia radiko. Al la homoj mi devis fari plezuron. Kaj nun, kiam mi devus fari novajn branĉidojn kaj novajn pinglojn, nun mi ne povas.

Kelkaj tagoj pasis. La suno brilis, kaj la branĉetoj fariĝis ankoraŭ pli sekaj.

— Kio nun okazos al ni? ili demandis la grosarbuston.

— Nun oni bruligos vin, ĝi respondis.

Kaj en tiu vespero, kiam oni per fajroj salutas la printempon, oni bruligis ankaŭ la stakon en la ĝardeno. En la aero jam estis la odoroj de printempo. La unuaj herboj elŝovis sin el la tero, la burĝonoj de la betuloj komencis malfermi sin.

Bele flamis la fajro en la krepusko sub la steloj. Kaj la branĉetoj fariĝis granda brila flamo, kiu dancis en la aero kaj ŝvebis supren kaj malaperis.

Homo, humile klinu vian kapon!
Estas la tero, kiu vin nutras,
kaj sub la polvo dormas la prapatroj.

Homo, humile levu la rigardon
al la sennombraj steloj en la alto!
Inter la steloj ŝvebas nia tero
kiel polvero en senfina spaco.

S t e l l a n  E n g h o l m.